

[noto]


Eldonita private en aprilo, 1933. Originale verkita en la angla de Lakṣmi Narasu, "The Essence of Buddhism". Takeuĉi Tookiĉi tradukis la unuan ĉapitron.

1933年4月発行。竹内藤吉訳。インドマドラス大学教授 Lakṣmi Narasu氏の原著 "The Essence of Buddhism" (立花俊道日本語訳『仏教の要諦』)の第一章「歴史的仏陀」のエスペラント訳。

[komento de Yamaguti S.]

Por transskribi proprajn nomojn la tradukinto ne konsideris principon, tial diversaj manieroj - malsamaj formoj - estas uzataj, foje esperantigite, foje en fonetika transliterumiado el la sanskrita aŭ el la palia, aŭ eĉ el la japana. Ne mankas gramatikaj eraroj. Cetere, kvankam la originala teksto havas la subtitolon "historical buddha", la enhavo alprenas senkritike multajn legendojn populariĝintajn en posta tempo.

固有名詞の表記に一貫性がなく、また文法上・語法上の誤りが多々あるなど、かなり問題のある翻訳である上、「歴史的仏陀」をうたうわりに史実ではなく後代の脚色をそのまま記述するなど、原文自体にも問題がある。明らかな間違いは注釈なく訂正した。



P. LAKŜMI NARASU

BUDAO

KOMPARITA KUN ANGLA ORIGINALO
DE
OKAMOTO JOŜICUGU

ESPERANTIGIS
TAKEUĈI - TOOKIĈI
LAŬ JAPANA TRADUKO

ELDONITA DE LA TRADUKINTO, TAKEUĈI - TOOKIĈI
JAMAŜIRO-MAĈI IŜIKAŬAKEN, JAPANUJO

1933

POR MEMORO
DE
FIDELAJ METIISTOJ
TAKEUĈI - TOOZABURO
8 IV 1844 - 12 X 1923

KAJ LIA FILO
TAKEUĈI- UNOKIĈI
12 II 1871- 14 VII 1931

*Kun klinita kapo mi salutas lin, kiu estas
La dispelanto de la mallumo de malklereco,
La gvidanto kompatoplena al perfekta vivo,
La floro de l' homaro, la majstro senkompara,
La sinjoro de saĝuloj, la savanto de l' mondo,
Sinjor' Budao - naskita kiel Princo Sidarto.*

*La suno brilas dum la tago,
La luno brilas dum la nokto;
Ksatrio brilas en armaĵo,
Bramano brilas en medito;
Sed la lum' de Budao brilas
Super ĉio en tag' kaj nokto.*

- Darmapado 387

BILDOJ


1. La reliefo de adorata Bodiarbo, kiu simbolas Budaon ĵus atingintan Bodion.
2. La reliefo de la Darma-rado adorata, kiu simbolas la predikantan Budaon.
3. La reliefo de la adorata stupo, kiu simbolas la mortintan Ŝakamunion.

La tri supre mendiitaj reliefoj estas sur la turo de Santi, kiu estas konstruita en la 3-a jarcento antaŭ Kristo. La tri bildojn afable permesis reprodukti sinjoro Henmi-Baiei, la aŭtoro de "Antikvaj skulptaĵoj en Santi de Hindujo."

4. Budao farita de hindo en la 5-a jarcento. Fotografita de Profesoro Ŝ. Akanuma.
5. Budao farita de ĥino en la 6-a jarcento.
6. Budao farita de koreo en la 8-a jarcento.
7. Budao farita de japano en la 8-a jarcento. Fotografita de S-ro Ogaŭa Seijoo.
8. Budao pentrita de japano en la 11-a jarcento.

La desegnaĵo sur la kovrilo estas farita laŭ la aŭreolo de la statuo farita en la 8-a jarcento.

bildo.1



bildo.2



bildo.3




bildo.4



bildo.5



bildo.6



bildo.7



bildo.8



VORTOJ DE LA AŬTORO

“En prezentado de la instruo de la majstro la disĉiploj nepre ne devas perdi fundamentajn principojn, el kiuj konsistas la instruo mem. Por Budao la voĉo aŭtoritata ekzistas en la vero. Kaj disĉiploj devas iri, kien ajn laŭ la konduko de la vero. Sekve, la devizo, kiu estis akceptita kiel sola principo inter budaismaj sektoj, estas tio, ke kiu ne akordas ekzakte al racieco, nome al vero, ne povas esti instruo de la majstro. Ĉiuj famaj Budaismaj verkistoj utiligis logikon kaj psikologion por prezenti resume la instruon. Ili konsideris oridinaran ekzaktecon de la koncepto tiel fidele, ke ofte ili flanken puŝis eĉ sutrojn, kiujn ili ordinare rigardis kiel bazon de la religio. Tial, kiam mi studas Budaismon per lumo de moderna konscio, ankaŭ mi ne malatentis tion, ke mi tute sincere apliku la metodon, kiu estis uzata de budaanoj de la plej malnova epoko de Budaismo. Se mi sukcesus doni moderan aspekton al budaismo, tio ne estas pro tio, ke mi kuiris modernan ideon per budaisma saŭco, sed mi gajnis la efikon elmetante en la lumon la esencan veron, kiu estas konservata en profunda fundo de ĉiuj formoj de Budaismo.”

“La kvintesenco de civilizita socio estas etikeca sed ne estas metafizikeca, tio estas vero. La forto, kiu fluas fundon de civilizita mondo kaj tenas ĝin, ne estas kredo en *ātman* kaj *brahman*, aŭ triunuo aŭ la senlimeco de Dio. Sed ĝi estas nur fido, kompatato, justeco, toleremo kaj amikeco, kiuj estas nomata resume Darma aŭ Budaismo. Estas prave ke la imperiestro Asoko akceptis Budaismon kiel bazon de sia regado. La blanka lumo de Budao ne penetras profunde en ideon kaj vivon de hindoj, ili ne povus esperi, ke ili rehavos la superecon, kiun ili posedis inter nacioj en tempo de Asoko, kaj ĝis kiam Darma fariĝas gvidspirito de ĉiuj popoloj, al ili paco kaj sendanĝereco ne estos garantiata. Tro granda estus la espero de l’ aŭtoro, ke tiu ĉi libro servu akceli tiel avida sopiratan celon. Nur mi esperas ke tiu ĉi servu por komprenigi pli bone la instruon de la majstro.

Decembro 1911

P. Lakṣmi Narasu
Minto 367 MADRAS Hindujo

Rimarkoj pri Novaj Radikoj

(1) En tiu ĉi libro laŭ mia opinio ni uzis la formon “Budao” por la internacie uzata sanskrita vorto “Buddha”. Por esperantigi la vorton ĝis nun oni enkondukis diversajn formojn: “Budao”, “Budeo”, “Buddo” kaj “Budho”.

Kial mi preferis la formon “Budao” ol aliajn? Pri tio mi skribis en la numeroj 1-a kaj 2-a de la 13-a jaro de la “Revuo Orienta” detale en japana lingvo kun esperanta resumo. Kaj do mi ne volas denove pridiskuti ĉi tie. Mi nur volas montri al vi ke la “Plena Vortaro de Esp” eldonita de SAT, 1931, alprenis la formon “Budao” kiel la plej taŭgan kaj definitivan, kaj ankaŭ la nova eldono de “the Esperanto-English Dictionary”, verkita de E. A. Millidge enkondukis la formon “Budao”, anstataŭ kiu oni trovis la formon “Buddo” en ĝia malnova eldono.

Mi esperas ke la plej taŭga formo “Budao” fariĝu la definitiva oficiala formo en proksima estonteco.

(2) En tiu ĉi libro laŭ mia opinio ni enkondukis unu novan sistemon, pri kiu mi devas iom priskribi.

Laŭ mia opinio propra nomo devas esti komencata per majusklo en la skribado kaj meti artikolon antaŭ propra nomo estas superflua pleonasmo. Kaj kiam ni volas skribi komunan nomon, ni devas skribi ĝin per minusklo.

Kiel vi vidas en la komenco de tiu ĉi libro, “budao” estas unu homo, kiu atingis idealan staton de intelekta kaj morala perfekteco. Kaj tial laŭ la teorio povas ekzisti multaj budaoj. Do la vorto “budao” ne estas propra nomo de iu difinita homo sed ĝi estas ĝenerala nomo por tiaj perfektaj homoj. Pro tio laŭ la supre menciita principo “budao” devas esti skribata per minusklo.

Sed el multaj budaoj la plej bone konata en la mondhistorio estas Gotamo Ŝakamunio, la fondinto de la religio Budaismo. Kaj tial per la titolo “Budao” oni ofte nomas lin. En tia okazo la vorto “Budao” ne estas komuna nomo sed ĝi estas la nomo de iu difinita persono. Do laŭ la supre montrita principo ni devas komenci per majusklo la vorton “Budao”, kiam ĝi montras la fondinton de Budaismo. (Kaj tiam ni ankaŭ ne metis artikolon antaŭ la vorto.)

Sammaniere “bagavo” aŭ “tatagato” estas nomo donita al iu persono, kiu atingis ian perfektecon kaj havas la indon esti nomata per la titolo bagavo aŭ tatagato. Kaj tial bagavo kaj tatagato estas komunaj nomoj, kiujn ni komencis per minusklo. Sed oni ankaŭ ofte uzas la titolojn por nomi Ŝakamunion. Kaj en tia okazo ni ankaŭ komencis per majusklo la vortojn en la skribado.

(3) En tiu ĉi libro ni ankaŭ enkondukis novajn radikojn por montri sanskritajn vortojn. Por esperantigi tiujn vortojn ni ne tiel sisteme agis sed nur laŭ oportuneco ni elektis ilin. Sed ni ĉiam deziris ke la nove enkondukota radiko havu la plej taŭgan formon kiel esp. radiko kaj ankaŭ estu la plej facile elparolebla.

Joŝicugu Okamoto

BUDAO

BUDAIAMO, kiu estas nomata Darmo inter siaj adeptoj, estas la religio predikita de budaoj. Budao estas homo, kiu estas atinginta Bodion. Bodio signifas idealan staton de intelekta kaj morala perfekteco kiun oni povas atingi per pure homaj rimedoj. Inter multaj, kiuj estas atingintaj Bodion, la plej bone konata en la historio estas Gotamo Ŝakamunio.

Pri Gotamo Ŝakamunio ĝenerale estas priparolite ke li estas la fondinto de Darmo. Sed Ŝakamunio mem parolis en siaj paroladoj, ke antaŭ li jam ekzistis multaj budaoj, kiuj predikis saman doktrinon. Kaj ni ne povas nomi Budaon la fondinto de Budaismo en la sama senco, kiel la fondinto de Kristanismo aŭ Mahometanismo. La fondinto de Kristanismo esence estas supernatura ekzistaĵo; li estas enkorpiĝo de la filo de Dio, kiu estas ne alia krom Dio mem. Neniu povas sin nomi vera kristano, kiu ne kredas ke Kristo reviviĝis post kiam li mortis sur la kruco por preni sur sin la pekojn de ĉiuj, kiuj kredas lin. Kvankam Mahometo, la fondinto de Mahometanismo, ne estas enkorpiĝo de Dio, aŭ iu el liaj parencoj aŭ servantoj, tamen li havis privilegion kiel la peranto de Dio, kiu komunikas supernaturan revelacion al la homaro, sekve neniu povas sin nomi mahometano ne kredante, ke Mahometo estas profeto de Dio. Sed Budao nenie pretendis sin iu superhoma estaĵo. Sendube ni vidas en li plenan kaj perfektan homon. Tute same li estis unu homo inter homoj. Li ne predikis, ke li alportas revelacion el supernatura fonto. Li ne proklamas sin savanto, kiu prenas sur sin la pekojn de homoj, kiuj lin sekvas. Li nenion deklaris krom tio instrui al homoj la metodon, per kiu oni povas sin mem liberigi same kiel li mem, ke ĉiu devas portadi la ŝarĝon de siaj propraj pekoj, ke ĉiu devas esti la savanto por si mem, ke eĉ Dio ne povas fari por homoj tion, kion povas plenumi homa memhelpo en formo de sinemancipo kaj sinkonkero. Ni legu en Darmapado, kolekto de versoj parolitaj de Budao, Ŝakamunio:

“Ĉio, kio ekzistas, estas la rezulto de tio, kion ni pensis; ĝi estas fondita sur niaj pensoj; ĝi estas farita el niaj pensoj.”

“Homo mem faras malbonon; homo suferigas sin mem; homo ne faras malbonon; homo purigas sin mem. Pureco kaj malpureco ambaŭ apartenas al li mem; neniu povas purigi alian homon.”

“Vi mem devas peni; budaoj estas nur instruantoj. Homo meditema, kiu eniras en la vojon, liberigas sin de la ŝarĝo de la peko.”

“Homo, kiu ne stariĝas, kiam li devas stariĝi, kiu estas mallaborema kaj senkuraĝa,

kvankam li ankoraŭ estas juna kaj forta, neniam trovos la vojon de klereco.”

“Laboremo estas la vojo de senmorto, mallaboremo estas la vojo de morto. Homo laborema neniam mortos; mallaborema estas kvazaŭ jam mortinta.”

Ankaŭ en la sutro Mahaparinirvana Budao admonas al Anando, unu el liaj tre amataj disĉiploj:

“O Anando, vi estu lampo por vi mem. Vi estu riguĝejo por vi mem. Alte tenu Darmon kiel lampon. Firme gardu Darmon kiel rifuĝejon. Ne serĉu rifuĝejon krom en vi mem.”

“Kaj ĉiu ajn, Anando, aŭ nun aŭ post mia morto, kiu estas lampo por si mem, kaj fariĝas rifuĝejo por si mem... Anando, tiu ja atingos la plej altan lokon inter tiuj, kiu serĉas Bodion.”

Budao ne parolis arogante, ke li estas tiu, kiu transdonas favorplenan revelacion de supernatura potenco al homoj, nek li proponis promeson, ke li liberigos el suferado kaj malĝojo, por rekompenco, homojn, kiuj nur kredas lin. Kaj plie li admonis siajn disĉiplojn, ke ili ne rigardu lian individuan personecon grava, sed ĉiam memoru la idealon. Ĝi estis dirita en Vaĵracediko:

“Tiu, kiu serĉadas min, nome, veran tatagaton, en iu materia formo, aŭ kiu serĉadas min en aŭdebla sono, tiu estas vaganta sur erara vojo kaj neniam vidos tatagaton.”

Similan parolon ni trovas en alia loko:

“Mi ne vidas la homon, kiu ne obeas al Darmono, eĉ se li diras, ke li vidas min, sed tiu, kiu tenas Darmon, eĉ se li loĝas en malproksima lando, loĝas ĉiam en mia vido.

La saman veron ni povas bone vidi en dialogo inter Budao kaj la bramano Dronao. En unu tago Dronao vidis Budaon sidanta sub arbo, kaj demandis al li: “Ĉu vi estas *deva*?” li respondis - “Ne, mi ne estas *deva*.” “Ĉu vi estas *gandarva*?” - “Mi ne estas.” - “Ĉu vi estas *jakŝa*?” - “Nek mi ests ĝi.” - “Ĉu vi estas homo?” “Nek mi estas homo.” La bramano mirigita devis demandi: “Kio do vi povas esti?” Budao respondis: “Se mi ne estas detruinta ĉiujn malbonajn influojn kaj voluptajn dezirojn, mi ankaŭ devus esti *deva*, aŭ *gandarva* aŭ *jakŝa* aŭ homo; sed mi komplete senigis ilin ĉiujn. Sciu, tial, o bramano, ke mik estas budao.” Ja klara estas la praktika signifo de tiu ĉi rakonto. Laŭ hinda mito *deva*, *gandarva* kaj *jakŝa* povas preni sur sin homan figuron. Sekve estas nature, ke la bramano demandis, ĉu la estaĵo en homa figuro antaŭ li estas *deva*, *gandarva* aŭ *jakŝa*. Sed konfuzon kaŭzis tio, ke li rievigis nean respondon al ĉiu el siaj demandoj, do

li devis fari la lastan demandon kaj la respondo de Budao estis klara. Por li la plaj grava estis ne lia korpo (*rupa*) sed lia karaktero (*nama*), la enkorpiĝo de Bodio, kiu signifas kompaton kaj saĝon en praktika vivo. Tial li estas ne nur Ŝakamunio, sed samtempe Tatagato. La eterna vero instruita de li estas nenio alia krom li mem, kiu konsistas en kvintesenco de lia personeco. Li vere estis tiu, kiu reprezentas en si mem la plej altan realecon en la tuta socio de la homaro. Tial ne estas mirinde, ke la personeco, kiu regas Budaismon, estas ne Ŝakamunio sed budao.

Kiel supre dirite, la plej grava estas la vivo, kiu akordas kun Darma, sed ankaŭ la personeco de la granda majstro, ne estas senvalora. En kondiĉo, ke la personeco estas la praktika enkorpiĝo de liaj instruoj, ĝi servas kiel modelo imitinda kaj sekvinda por la adeptoj. Kiel diras Amitajurdjana Dutro: "Pro tio oni meditas pri la korpo de Budao, oni ankaŭ vidas la animon de Budao. La animo de Budao estas absolute granda kompatato por ĉiuj estaĵoj." Sed samtempe oni devas memori, ke la insruo de Budao ne havas sian religian valoron en iu miraklo aŭ iu speciala okazintaĵo dum lia vivo, kiel ĉe multaj aliaj religioj. Tial se ĉiuj okazintaĵoj en la tuta vivo de Gotamo Ŝakamunio perdis sian historiecon, tio ne povas difekti la meriton de lia insruo. Kiel Budao mem parolis, la insruo mem pravas sian propran veran valoron.

Senigitaj for de misteraj ornamoj, la ĉefaj okazaĵoj en la vivo de Gotamo Budao estas facile rakontebaj. Li naskiĝis meze de la sesa jarcento antaŭ Kristo (563 A.K.) en Lumbini Parko proksima de kapilavasto, nun Padaira, en la norda parto de la distrikto Gorakpur. Por signi la lokon, kie naskiĝis la plej granda instruisto de la homaro, ankaŭ por montri sian respektigon al li Imperiestro Asoko en 239 A.K. starigis ŝtonan monumenton kun epigrafo: "Tie ĉi Budao naskiĝis (HIDA BAGAVAM ĴATEKI)."

En Kapilavasto loĝis ĉefoj de gento Ŝakao, kies nomoj kredeble ne havus lokon por si en homa historio, se ne naskiĝus Sidarto inter ili. La patro de Gotamo Sudodano, kaj lia patrino Majao, la filino de Suprabudo, ankaŭ apartenis al tiu ĉi gento. La patrino de Sidarto mortis la sepan tagon post lia naskiĝo. Sub la karesa zorgo de lia onklino, Praĵapati Gotami, fratino de lia patrino, Sidarto pasigis siajn infanajn tagojn en komforto, lukso kaj bona edukado. Neniaj doloroj estis neglektitaj por ke la vivo de la infano estu trankvila. En la aĝo de dek ses jaroj li edziĝis kun sia kuzino, Jasodaro, filino de la ĉefo de Kolio; kaj poste inter ili naskiĝis filo Rahulo. Dum dudek kvin jaroj, Sidarto nur vidis belajn kaj agrablajn aferojn. Ĝuste tiam la malĝojoj kaj suferoj de l' homaro profunde enmordis en lian koron kaj lin meditigis en la problemo de l' vivo. Puŝita de arda deziro por scii la originon de sufero kaj malĝojoj, kaj por trovi rimedon forigi ilin, en la aĝo de 29 jaroj li forŝiris de si la ĉenon de sia familio, kaj rifuĝis en arbaron, laŭ tiutempa moro.

"Tio estas ne pro malam' al la infano dolĉa,
Tio estas ne pro malam' al la edzin' amata,
De la kor' ligilo - nek amis ilin li malmulte -

Por aspiro al budaec' nur li rezignis ĉion."

Post tiu granda forlaso (ABHINĜKRAMANA) la bodisatvo, la serĉanto de Bodio, metis sin sub spirita gvido de famaj bramanoj, Arada Kalamo kaj Udraka Ramaputro. La unua el ili loĝis en Vesalio kaj estis la estro de multaj adeptoj. Estas evidente, ke li estis adepto de Kapila, kiu estas supozita fondinto de Sankaja sistemo de filozofio kaj li metis ĉefan akcenton sur kredo de *âtman*. Laŭ lia opinio, la ekzisto de la spirito estas nepre necesa por religio. Sen la kredo de la eterna, nemateria spirito, li povis trovi neniun savvojon. Simile al *munĝa*-herbo, kiam ĝi liberigis sin el sia kornosimila ŝelo, aŭ al sovaĝa birdo, kiam ĝi liberigis sin de kaptilo, ankaŭ la spirito povas atingi perfektan liberecon, kiam ĝi forlasis sian materian limon (UPĀDHI). Kiam la memo konscias sian nematerian naturon, ĝi povas atingi veran liberecon. Tiuj ĉi instruoj ne kontentigis la bodisatvon, sekve li forlasis Arada Kalamo kaj metis sin sub la instruado de Udraka Ramaputro. Tiu ĉi kredeble estis adepto de Vaiseŝika sistemo, ankaŭ li multe parolis pri la demando de "MEMO", sed li metis ĉefan punkton sur la efektoj de karmo, kaj la samsaro de spiritoj. La bodisatvo vidis la veron en la doktrino de karmo, sed li ne povis kredi ekziston de la spirito kaj ĝian samsaron. Tial li forlasis ankaŭ Udraka, kaj vizitis pastrojn servantajn en temploj por provi, ĉu li povas lerni de ili la vojon liberigi sin el la sufero kaj malĝojo. Sed la ĝentila naturo de Gotamo ne permesis al si toleri nebezontan kruelan oferbuĉon sur altaroj de dioj, kaj li instruis al la pastroj, kiel vanta afero estas pereigi vivojn por kompensi malbonajn agojn kaj kiel nebla afero estas praktiki religion ignorante moralan vivon.

Vagante eliris^[tiel!] el Vesalio por serĉi pli bonan sistemon, Sidarto alvenis al ermitejo de kvin disĉiploj de Udraka, kies ĉefo estis Kondinjo, en la densa arbaro de Uruvilva apud Gajao en Magado.

Tie li vidis la kvin ermitojn bridantajn siajn sentojn, dresantajn sian pasion, kaj praktikantajn asketadon. Li admiris ilian fervorecon kaj seriozecon, kaj por provi la rimedojn faratajn de ili li aplikis al si la asketadon. Dum ses jaroj li praktikis la plej severan sinstrumentadon, ĝis lia korpo fine fariĝis tute kaduka kiel vintra branĉo.

En unu tago post kiam li banis sin en la rivero Nairanĝana (nuna Phalgu), li klopodis surbordiĝi el la akvo, sed li ne sukcesis pro tora konsumiĝo. Li apenaŭ povis ellasi sin el la akvo de la rivero, grimpante per branĉo de arbo sin klininta. Sed sur revenvojo al sia loĝejo li ŝanceliĝante falis sur la teron preskaŭ morta, hazarde lin trovis Suĝato, la unua filino de bovpaŝtisto, kiu loĝis en proksimo de la arbaro, kaj donis al la bodisatvo kaĉon el rizo kaj lakto. Tiamaniere refreŝigita li mem eksciis, ke tro severa asketado ne kondukas lin al la celo, kiun li aspiras atingi, kaj ĝi nur rezultigas konsumiĝon de korpo kaj animo. Tial li ĉesigis ĉiun asketan praktikon kaj zorgante necesan postulon de l' korpo komencis vivi en plena medito kaj introspekto. Kaj li profunde konfidis al sia racio, la lumo, kiun portas kun si ĉiu el ni por akiri la veron.

“Vero estas interne de ni mem; ĝi ne devenas
De aliaj krom vi mem, kion ajn vi povus kredi.
Ni ĉiuj interne havas centron,
Kie vero estas riĉe plenigita; kaj ĉirkaŭe,
Pario sur pario, la dika karno envolvas ĝin firme,
Tiu perfekte klara percepto - ĝi estas vero,
Sed malhelpa kaj malvirtiga karna reto
Ĝin enkarcerigas kaj erarigas ĉiujn: kaj scii^[tie!!]
Prefere konsistas en tio malfermi elirejon
Tra kiu povas elkuri malliberigita lumo,
Ol en tio doni enirejon por lumo
Supozita esti ekstere.”

En unu nokto, sub figarbo (*figus religiosa*) sidanta li profunde meditis, kaj ekhavis konscion de vera prudento. Li konvinkiĝis, ke tiam ĝenerale kredita religio estas erara vojo. Li eksciis la fontojn, el kiuj elfluas surtera sufero de l' mondo kaj la vojon, kiu kondukas al ilia detruo. Li vidis ke la kaŭzo de l' sufero devenas de alfiksiĝo egoisma al vivo, kaj ke la vojo eligi sin el la sufero estas akiri dek perfektecojn (DACA PARAMITAS). Per tiu ĉi percepto de tiuj grandaj veroj kaj ilia realiĝo en vivo, la bodisatvo fariĝis klera; li tiamaniere atingis sambodion kaj fariĝis budao. Prave estas nomi sambodion SVABODHNAM, mempercepto, pro emfazi la fakton, ke ĝi estas kompletigita nur per sola memhelpo, ne ricevinte helpon potencon de iu ajn instruisto aŭ dio, *Isvara*. Kiel kantis la poeto:

“Escepte la lumon de sia animo sur la kapo
Neniu kondukas homon, neniu estas kondukita.”

Nun temen al li alvenis la plej grava krizo en lia vivo. Post multe da interbataloj li eltrovis la plej profundajn verojn, verojn signifoplenajn sed kompreneblajn nur al saĝuloj, verojn favorplenajn sed nekompreneblajn al ordinaruloj (*prtagĵana*). Tamen la homaro, kiu soifas plezuron dronante en bagateloj ĉiutagaj, kaj restas sensaĝa katenite de erarigaj pensoj, kvankam ili nature posedas kapablon por scio kaj virto, kaj havas povon enpenetri en veran naturon de aferoj. Ĉu ili povas liberigi sin de la animisma ideo de animo kaj kapti la veran naturon de homo? Ĉu ili povas venki la inklinon serĉi saviĝon per peranta kasto de pastroj? Ĉu ili povas kompreni la finan staton de paco, tiun estingiĝon de ĉiaj surteraj deziroj, kiu kondukas al feliĉoplena haveno de nirvano? Ĉu estas konsilinde ke li instruu la verojn, kiujn li eltrovis, al la homaro en ĉi tiaj cirkonstancoj? Ĉu tio ne alportas malsukcesan rezulton en sufero kaj turmento? Tio estis la duboj kaj demandoj, kiuj aperis en li koro, sed poste estis sufokitaj kaj estingitaj de pensoj de universala kompatato. Ĉiun sian egoismecon forĵetinta li ne povis ne vivi

por aliaj honoj. Por vivi por aliaj, ĉu ekzistus pli bona rimedo ol montri al ili la vojon atingi al perfekta feliĉo? Ĉu ekzistus pli grava tasko por la homaro ol savi vivantaĵojn, kiuj baraktas dronante en la funebra maro de samsaro? Ĉu la donaco de Darmo ne estas la plej granda el ĉiuj donacoj? Kiam la perfektulo konsideris, kiel malĝojo kaj sufero premegeas ĉiujn vivantaĵojn, li sentis tre grandan kompaton, kaj decidis diskonigi al la tuta homaro la eternajn verojn, kiujn li mem eltrovis.

“En popolojn mi iru, kaj malfermu la pordegon,
Kiu kondukas al la senmorteco.
Al tiuj, kiuj havas orelojn por aŭdi,
Instruu la noblan vojon de saviĝo.”

Kun tiu ĉi firma decido li ekiris al la urbo Benareso, kiu estis fame konata kiel centro de religia vivo kaj ideo dum kelkaj jarcentoj. Sur la vojo Budao renkontis sian konaton Upaka, nuda Ĵajna monaĥo, tiu vidis lian majestatan kaj ĝojplenan aspekton kaj demandis lin kun kortuŝo: “Kiu estas la instruanto, sub kies gvido vi vin liberigis?” Budao respondis: “Mi ne havas instruanton. Neniu ekzistas komparebla kun mi. Mi estas la perfektulo, budao. Mi atingis pacon. Mi akiris nirvanon. Por fondi la regnon de justeco mi iras al Benareso. Tie mi lumigos la lanternon de vivo por la bono de l’ homoj, kiuj estas dronantaj en la mallumo de peko kaj morto.” Upaka tiam demandis: “Ĉu vi deklaras vin ke vi estas *ĵina*, venkinto de la mondo?” Budao respondis: “*Ĵina* estas tiuj, kiuj venkis sin mem kaj sian pasion, nur tiuj estas venkintoj, kiuj kontrolas siajn pasiojn kaj detenas sin de peko. Mi jam venkis min mem kaj konkeris ĉiujn pekojn. Tial mi estas *ĵina*.”

“Li, kies vivo estas pura, kies penso estas bona,
Kies vasaloj sentoj^[tiel!] respektas lin suverenen,
Kies koron kaj animon ne malhelpas eĉ korligniteco,
Kies kapon kaj bruston plenigas amo kaj ĝojo,
Kiu senkompatan malklerecon pereigis,
Kiu fierecon de egoismo forigis,
Kiu purigis sin de malpuraĵoj ĉiuspecaj,
Kombinas veron, kuraĝon kaj rimedon,
Kun antaŭvido, kompatego kaj rezulteco;
Li ĉiujn katenojn tute disrompis
Kaj akiris venkon gloregan kaj veran.”

En Benareso li renkontis Kondinjon kaj liajn kvar kunulojn en Cervo-Parko, Isipatana. Kiam ili kvin vidis Tatagaton alproksimiĝanta al ili, ili decidis ke ili ne leviĝu por akcepti lin, nek salutigi lin, nek servu al li por doni manĝaĵojn kutimajn, kiam li

venos, ĉar li rompis sian unuan promeson ĉesiginte la asketajn praktikojn. Sed kiam Tatagato venis proksimen al ili, ili nevole starigis sin de sia sidloko kaj salutis lin spite de la decido kaj proponis al li ke ili lavos liajn piedojn kaj faros ĉion, kion li postulas. Sed ili nomis li per lia familia nomo Gotamo. Tiam Bagavo diris al ili: “Ne nomu min per mia familia nomo, ĉar tio estas ne deca por nomi personon, kiu atingis arahaton. En mia koro estas tute egale, ĉu oni respektas min aŭ ne respektas min. Sed estas ne dece nomi per familia nomo la homon, kiu rigardas ĉiujn vivaĵojn egale kun kompatoplena koro. Ĉar budaoj alportas al la mondo savon, oni devas akcepti ilin kun respekto kiel filoj sian patron.” Kaj tiam Budao faris la unuan grandan predikon DARMAĈAKRA-PRAVARTANA SUTRO, en kiu li klarigis la kvin^[tiel! verŝajne devus esti “kvar”] grandajn verojn kaj la noblajn santajn ok vojojn, kaj konvertis ilin. Ili ricevis la ordonon kaj fomis la unuan kernon de la sankta rondo de liaj deiĉiploj konata en la vorto samgo. Baldaŭ poste, en unu nokto la budao renkontis Jaŝao, juna filo de riĉa komercisto (*sreŝti*) de Benareso, kiu vagadis kiel freneza suferante pro la doloroj de tiu ĉi mondo. La tatagato kun konsolo instruis al li la vojon al feliĉo de nirvano, kaj faris lin sia disĉiplo. Vidante ke Jaŝao fariĝis bikŝuo, liaj 54 ludamikoj ankaŭ aliĝis al la samgo. Tatagato sendis tiujn ĉi 60 misiistojn al diversaj lokoj por instrui la universalan religion. Post iom da tempo Budao havis milon da novaj disĉiploj per la konverto de tri ĉefoj de fajrokultantoj Uruvilva Kasjapo, Nadi Kasjapo kaj Gaja Kasjapo, ĉiuj fratoj, kun ĉiuj iliaj sekvantoj. Sur la monteto apud Gajao li predikis al ili pri brulofero. En tiu ĉi prediko li klarigis, kiamaniere senklereco naskas tri flamojn: avareco, kolereco, stulteco, kiuj brulpereigas ĉiujn vivaĵojn ankaŭ kiel tiuj tri flamoj estingiĝas per ĉesigo de peko kaj per sakvado de justa konduto.

De Gajao marŝis kun siaj multaj disĉiploj Budao al Raĵagrijo, ĉefurbo de Magado. Antaŭe post sia granda rezignacio Sidarto pasis tra la urbo, tiam Bimbisaro, la reĝo de Magado, penis rezigni la decidon de la bodisatvo atingi Bodion. Sed la peno estis vana, kaj la reĝo do petis al li, ke kiam li atingos la celon, bonvole li revenu al Raĵagriho, kaj akceptu lin kiel disĉiplon. Por plenumi lian peton nun Bagavo vizitas Raĵagrihon. Aŭdante ke Bavavo alvenis, la reĝo Bimbisaro iris al la loko, kie restas Budao, akompanate de la ministroj, generaloj kaj multaj bramanoj kaj riĉuloj en Magado. Kiam la reĝo kaj liaj akompanantoj vidis Uruvilva Kasjapo kun Bagavo, ili suspektis, ĉu Bagavo metis sin sub la spirita gvido de Uruvilva Kajapo. Sed Kasjapo forigis ilian suspekton per la adorkliniĝo ĉe la piedoj de Bagavo, kaj klarigis al ili ke post la ekvido de la paco de nirvano li jam ne povas esti kontenta je oferoj, kiuj promesas nenion pli bonan rekompencan ol plezuron kaj virinojn. Bavago penetrante animstaton de ĉiuj ĉeestantoj instruis al ili pri la nekonstanteco de la memo, tiel nomata mastro de scio, kiu naskiĝis el sentoj kaj memoro, certe devas esti atendata de morto. Aŭskultinte tiun ĉi predikon, la reĝo kaj multaj akompanantoj kredis Budaon, Darmon kaj Samgon kaj ili fariĝis liaj disĉiploj enhejmaj. Kaj la reĝo invitis Bagavon al sia reĝa palaco kaj regalis

lin kaj liajn bikŝuojn, kaj donacis al la samgo sian plezuran ĝardenon, la bambuaron Venuvano, kiel loĝlokon de senhejmaj disĉiploj de la granda instruisto.

Afero pli grava, koncerne al restado de Bagavo en Raĵagriho, estas konvertiĝo de Ŝariputro kaj Maŭdgaljajano, du disĉiploj de migranta monaĥo Sanĵaja. En unu tago, kiam Asvaĵito, unu el la kvin unuaj disĉiploj de Budao, pasis por almozo, Ŝariputro rigardante lian noblan dignoplenan aspekton demandis al li, kiu estas lia instruisto kaj al kiu skolo li apartenas. Asvaĵito respondis al li ke Budao estas lia instruisto, kaj prezentis al li la instruon de Tatagato en famaj versoj;

“Taj ajn aferoj devenas de kaŭzo,
Ilian kaŭzon klarigis Budao
Kaj tion, kio estas ilia estingiĝo.
Tio estas la instruo de granda Ŝramano.”

La versojn aŭskultante, Ŝariputro vizitis Maŭdgajjajanon kaj parolis al li ĉion, kion li aŭskultis. Ili ambaŭ, akompanate de ĉiuj siaj disĉiploj, iris al Tatagato kaj ili trovis sian rifuĝejon en Budao, Darma kaj Samgo. Budao estimis ambaŭ homojn pro ilia saĝeco kaj klereco. Oni diras ke iuj el la Abidarmaj dokumentoj, filozofia parto de Tri Pitakoj, estas kompilitaj de tiuj ambaŭ bikŝuoj. Dum loĝado de Majstro en Venuvano, aliĝis al la samgo ankoraŭ unu grava persono, saĝulo de bramano, Maha Kasjapo, kiu forĵetis sian belan kaj virtan edzinon kaj ĉion el siaj multaj posedaĵoj por trovi sian savvojon.

Tiu estas li, kiu post la Parinirvano de l' msnstro sub la patronado de la reĝo Aĵatasatro arangis kunvenon en Raĵagriho por kolekte kompili Tripitakon, Budaisma Biblio, per kolektiva kunlaboro de multaj bikŝuoj. Li fakte estis unua patriarko de Budaisma Eklezio.

Dum sia aktiva vivado kiel instruanto, Bavavo akceptis multegajn konvertitojn. Altklasaj kaj malaltklasaj, riĉaj kaj malriĉaj, kleraj kaj malkleraj, bramanoj kaj ĉandaloj, ĵainoj kaj aĵivakoj, laikaj kaj asketaj, rabistoj kaj hommanĝantoj, noveloj kaj kamparanoj, viroj kaj virinoj, homoj de ĉiuj klasoj kaj situacioj sendis al li el si multajn disĉiplojn, laikajn kaj asketajn. Inter tiuj adorantoj sin trovis Prasenaĵito, reĝo de Kosala, Panĉasika, disĉiplo de Kapila, Maha Katĵajano en Benareso, Udajno, reĝo de Kaŭsamibi, Kutadanto, la ĉefo de Bramana komunumo de la vilaĝo Danamati, Kriŝi Baradvaja de la bramana vilaĝo Ekanala, Angulimala, la terura rabisto kaj mortigisto, kiun timis la tuta loĝantaro en la regno Kosalo, Alavaka, la hommanĝinto de Atavi, akrobato Ugraseno, barbiro Upalo, kiu havis honoron reciti parton de Vinaja Kolekto de Tri Pitakoj, ĉe la kunveno laŭ konsilo de la Kasjapo, kaj Sunito, kiu estis de ĉiuj malestimita stratopurigisto. Kelkaj anoj el ŝaka gento, kiuj estis parencoj intimaj aŭ familianoj de Sidarto, ankaŭ fariĝis disĉiploj de Ŝakamunio. Sudodano, la patro de Sidarto, fariĝis disĉiplo laika, kaj Rahulo, lia filo sola, eniris en Samgon. Jasodaro, la edzino de Sidarto, Praĵapati Gotami, lia onklino, ambaŭ aliĝis al bikŝuina samgo, kiun nevolonte permesis

fondi la majstro laŭ petego de Praĵapati Gotami kaj propeto de Anando. Anando, konstanta akompananto kaj persona servanto de Budao, estis unu el liaj kuzoj.

Alia el liaj kuzoj estis Devadato, kiu estis poste fame konata pro tio, ke li provis por fondi sian novan skolon kun pli severaj kaj rigoraj leĝoj ol Budaaj. Kiam li ne povis sukcese akiri multe da disĉiploj, kvankam li havis specialan viharon, kiun konstruis la reĝo Aĵatasatro, la filo de la reĝo Bimbisara, li komplotis multon por pereigi vivon de Ŝakamunio. Foje li sendis mortigistojn por mortigi Bagavon, sed apenaŭ ili vidis kaj aŭskultis Budaon, ili tuj konvertiĝis. Iam granda roko, rulfaligita de la supro de Gridrakuto por premi Bagavon, rompiĝis en du pecojn kaj preterpasis ne grave vundante Budaon. Kiam oni lasis kruele ebrian elefantegon sur la vojon, ĝuste kiam la majstro promenis tie, sed la elefanto fariĝis milda antaŭ li. Post tiaj malsukcesoj Aĵatasatro multe suferis pro granda riproĉo de sia konscienco, kaj do venis al Budao, kaj aŭskultis lian instruon de la savo por trovi pacon en la suferado.

Dek du el liaj disĉiploj fariĝis fame konataj kiel predikistoj. Iliaj nomoj estas Aĵnato Kaŭndinjo, Asvaĵito, Ŝariputro, Maŭdgaljajano, Maha Kasjapo, Maha Katjajano, Anurudo, Upalo, Pindola Baradvaĵo, Kaŭsĉilo, Rahulo, kaj Purna Maitrajaniputro. En interparolo kun Subadro ĝuste antaŭ sia morto Budao diris: “Miajn dek du grandajn disĉiplojn, kiuj tenas sin bonege kaj la mondon vekas kaj savas al indiferenteco, kiujn oni nenie povas trovi ekster mia samgo.”

Ingter multaj patronoj kaj favorantoj de Budao neniu estis fame konata krom Anatapindikio, protektanto de orfoj, Ĵivako, kuracisto, Visakom la patrino de Migaro, kaj Ambapalo, publikulino de Vesalio. Sudato, kiu estis nomata Anatapindika, patrono de orfoj, pro lia kompatemo al orfoj kaj al malriĉuloj, estis tre riĉa negocisto en Sravasto. Li aĉetis grandan parkon el Sravastio de Princo Ĵeta per grandega monsumo, kaj konstruis belegan Ĵetavana-Viharon por Budao kaj liaj bikŝuoj. Ĵivaka estis fama kortega kuracisto de la reĝo Bimbisaro, kaj li estis ordonita de la reĝo, ke li servu al Budao kaj liaj disĉiploj por ilia sano. Laŭ lia peto, bikŝuoj ricevis permeson akcepti veston de laikaj disĉiploj, antaŭe ili nur kovris sin per cifonaĵoj, kiujn oni forĵetis eluzinte. Visako estis bofilino de Migaro, riĉega ĵajna komercisto en Sravasto, sed oni nomin ŝin “Patrino” de Migaro, ĉar ŝi estis la kaŭzo de konvertiĝo de Migaro al budaisma kredo. Ŝi fariĝis la unua patronino de la laikaj fratinoj, kaj ŝi ricevis la permeson liveri ĉefajn necesojn por ĉiutaga vivo en granda skalo al bikŝuoj kaj bikŝinoj. Ŝia alia servo estis konstruo de la viharo Purvaramo apud Sravaŝto, kiu en sia belgeco estis malsupera nur ol la viharo konstruita de Anatapindikio. Ambapalo, “kiu estis bela, gracia, plezura kaj naturdonita per la plej belega vizaĝo, kompetenta en dancado, kantado kaj ludado de liuto, kaj dank’ al kiu Vesalio pli kaj pli fariĝis prospera,” dediĉis al Budao sian luksan loĝejon kaj mangarbaron, kaj ŝi mem fariĝis bikŝuino.

En la tempo de Ŝakamunio, Hindujo estis en la stato de granda kaoso de ideoj. Tie sin trovis instruistoj malpli famaj ol Gotamo Budao. La Budaismaj skriboj speciale mencias pri almenaŭ ses herezaj instruistoj. Unu el ili, Sanĵaja Viatiputra insistis ian

skeptikismon, ignorante sian tutan scion. Ajita Kesakambali insiste neis ke scio konsistas en altgrada konjektado, nek permesis vivon en alia mondo, kaj analizis homon en kvar elementojn, tero, akvo, aero, fajro - kiuj diseriĝas ĉe la morto. Purana Kasjapo estis indiferentisto, kiu ne distingis gradojn en moralo, kaj sekve, li ne vidis meriton nek malmeriton. Maskarin Gosala, supozita eble la fondito de la sekto de Aĵivaka, estis fatalisto kiu ne permesas memkonscian agon kaj karmon. Laŭ lia koncepto, ĉiu ekzistaĵo estas ekscitita nur de *nijati*, nome fatalo, por plenumi la leĝon de sia naturo. La homo ne havas potencon formi sian vivon. Ĉio trapasas destinitan vicon de la vivoj post la mortoj, kaj fine estingiĝas la doloro de malsaĝulo tute same kiel de saĝulo. Bagavo insiste riproĉis la instruon de Gosala kiel la plej malbonan el erarigaj ideoj. Nirgranĉa Ĵnatiputra, kiu estis konata inter ĵajnanoj en la nomo Mahavira, estis unu el renovigintoj de Ĵajna kredo. Li predikis realecon de spirito individua kaj kontinuecon de persona identeco post la morto. Li kredis ne nur transmigradon de l' spirito, sed ankaŭ li alportis rondirejon de metempsikozo ĝis la plantoj kaj senvivaĵoj sub la nivelo de animala ekzistaĵo. Lia savvojo staras sur la bazo de asketado kaj neagado. Li laŭdis sinmortigon kiel "bonan, perfektan, konvenan, beligan kaj meritan." Ĵajnanoj diras, ke Mahavira havis ducent mil gedisĉiplojn, monaĥajn kaj laikajn.

La granda bonfamo de la majstro kaj la donacoj, kiujn liaj sekvantoj ricevis de laikaj piemuloj, vokis ĵaluzon inter ĉefoj de herezaj sektoj. Ili konspiris perdigi la reputacion de Ŝakamunio kaj detruu lin antaŭ la popolo. Ili persvadis herezan monaĥinon Ĉinĉa por kalumnii lin per adulto antaŭ popolamaso. Ŝia kalumnio estis malkovrita kaj ŝi devis fali en teruran suferon pro sia malbona ago. Malgraŭ tiu malsukceso la ĉefoj de herezaj sektoj denove komplotis por kalumnii la majstron. En tiu ĉi fojo ili persvadis monaĥinon Sundari, membro de unu el la herezaj sektoj, por dissemiĝi famon, ke ŝi pasigis nokton en la dormoĉambro de la majstro. Kiam tiu ĉi kalumnio estis sufiĉe konata de popolo, ili subaĉetis bandon da ebriuloj por ŝin mortigi. La friponoj mortigis ŝin kaj forĵetis ŝian kadavron en la arbetaron proksiman de Ĵetavana viharo. La herezuloj insiste postulis al la institucio de leĝa procedo kondamni laŭleĝe la grandan sinjoron. Sed feliĉe fariĝis vana ilia intrigo pro neatenteco de la ebriegaj friponoj, kiuj kunsidis post la atenco en drinkejo kaj ekscitite de drinkego, komencis disputon inter si kaj reciproke insultis imputante la krimon unu al alia, kaj ili interbatalis. Baldaŭ ili estis arestitaj de policanoj kaj estis kondukitaj en la reĝan tribunalon. Kiam oni demandis al ili pri la mortigo de Sundari, tuj ili malkaŝe konfesis sian krimon, eĉ diris la nonojn de tiuj, kiuj subaĉetis ilin por la atenco. La reĝo kondamnis la mortigintojn kaj instigintojn al mortopuno. En alia fojo, herezuloj instigis Ŝrigupton por pereigi la vivon de Budao veneni lian manĝaĵon kaj erarkonduki lin en fajran puton,^[tiel! ŝajne mankas vortoj] per kompatado kaj kvietado pardonemo, Bagavo

“Savis Ŝrigupton el malamo kaj krimo
Kaj montris kiel kompatado venkas eĉ malamikon,

Kaj tiel li instruis pardonemoan regulon altegan
Por liberigi siajn sekvantojn el la mondo kaj mizero.”

La vivmaniero, en kiu la kleruro ordinare pasigis ĉiun tagon, estis tre simpla. Li ĉiam leviĝis frumatene kaj mem lavis kaj vestis sin sen helpo. Li meditadis sola ĝis la tempo viziti urbon por ricevi sian manĝaĵon. Kiam la tempo venas, li mem sin vestas dece, tenante pladon en mano, sola aŭ kune kun disĉiploj, vizitas urbon aŭ vilaĝon en proksimo. Post la finiĝo de sia manĝo en iu domo, li instruas Darmon por la mastro kaj lia familio laŭ ilia kapableco de anima klereco. Reveninte al sia loĝejo li atendas en malfermita verando ĝis kiam la disĉiploj finas sian manĝon. Poste li retiriĝas en sian privatan apartamenton kaj li sugestas objektojn por pensado al kelke da disĉiploj kaj poste li iom ripozas dum varmega tagmezo. Posttagmeze li renkontas homojn, kiuj kunvenis en aŭditorio el proksimaj urboj kaj vilaĝoj, kaj instruis Darmon en la maniero konvena je la tempo, taŭga je ilia kapableco. En vespero li banas sin por refreŝigi, se necese, kaj por iuj el la disĉiploj klarigas malfacilaĵon aŭ komentarias pri la doktrino, tiamaniere li pasigas fruvesperon. Parton de la restanta li pasigas en meditado, promenante tien kaj reen ekster la ĉambro, kaj la alian parton de nokto li dormas en sia dormoĉambro. Dum naŭ monatoj de bela vetero ordinare li piediris de loko al loko 20-30 kilometrojn ĉiutage. Dum pluvoriĉa sezono li ordinare restis en Ĵetavana Viharo aŭ en Purvaramo.

La klariga metodo de Bagavo diferenciĝas plene de tiu de la bramanoj. Li ne prezentis sian ideon en formo karakterize konciza de bramanoj, sed li prezentis sian instruon en formo de prediko. Anstataŭ doni sekrete misteran instruon al malmultaj homoj, li ĉiam instruis al granda aŭdantaro, kiu konsistis el multaj homoj dezirantaj lin aŭskulti. Li parolis per maniero facile komprenebla al ĉiuj homoj, kaj multfoje ripetis la instruon por ke la ideo estu impresata eĉ al malplej atentemaj koroj kaj malplej memoremaj. Li intruis laŭ la kapableco de aŭdantoj. Li unue parolis pri devoj de moraleco, pri la estonta feliĉo, pri danĝero, vaneco kaj la malpureco de volupto, kaj pri la benoj de la forlaso de volupto. Tiamaniere li pretigis menson de aŭskultantoj, kaj kiam li vidis ke la koroj fariĝis senanatŭjuĝaj, impresemaj, liberaj de malhelpaĵo de komprenado de la vero, kaj noble kredema, tiam il predikis la specialan doktrinon de budao, nome, suferado, la kaŭzo de suferado, la neniigo de suferado kaj la vojo. La profunda diferenco inter la metodo de Budao kaj tiu de bramanoj penetras plene ĝis la esenco de la Budaismo, kies plej rimarkinda trajto estas prozelitismo.

Dum lia diskutado kun kleruloj estis iom formala kaj ofte eĉ malvarme logika, en sia interparolado kun ordinarioj la majstro ĝenerale utiligis alegoriojn kaj parabolojn, fablojn kaj popolrakontojn, historiajn anekdotojn kaj epizodojn, proverbojn kaj popolajn diraĵojn. La parabolo de sinapa semo, kiun mi priskribos en la senvanta ĉapitro, ilustras, kiel la majstro alportis klaran veron en la animon de simplaj homoj. Ĉe la konvertiĝo de riĉa bramano Kriŝi Baradvaĵo, Budao verkis procedon de terkulturo en

ellaboritan alegorion. En unu tago kiam li restis en suda distrikto de Magada (Daksinagiri), Budao vizitis bramanan vilaĝon Ekanala. Baradvaĵo tiam inspektis laboristojn sur sia kampo. Kun plado en la mano Budao alproksimiĝis al la bramano. Kelkaj laboristoj riverencis al Budao, sed la bramano riproĉe diris al la majstro: “O, Ŝramano, mi plugas kaj semas, kaj mi manĝas per plugado kaj semado; estas pli bone se vi plugos kaj semos same kiel mi, kaj tiam vi gajnos manĝaĵojn.” “O, bramano, respondis Budao, “Mi plugas kaj semas, kaj manĝas per plugado kaj semado.” “Sed,” denove la bramano demandis, “Se vi estas terkulturisto, kie estas ĝia signo? Kie estas viaj bovoj kaj plugilo?” Tiam la instruisto diris, “Kredo estas semo, kiun mi semas; modesteco estas plugŝafto; menso estas ligilo de jugo; atenteco estas plugilŝtalo kaj pikilo. Vereco estas rimedo por ilin kunligi; mildeco estas por malligi. Energio estas jungaĵo kaj mia bovo. Tiamaniere tiu plugado estas efektiva, ditruante la malbonherbojn de iluziigo. La rikolto, kiun ĝi produktas, estas la ambrozia frukto de Nirvano, kaj per tiu plugado ĉiuj malĝojoj estas alportitaj al la fino.” Tiam la bramano enverŝis laktokaĉon en oran pladon kaj donis ĝin al Budao kun admirplena parolo: “Manĝu, O, Gotamo, la laktokaĉon. Vere vi estas kulturisto; ĉar vi, Gotamo, plenumas plugadon, kiu donas la frukton de senmorteco.” Kiam la majstro deziris doni la instruon aŭ riproĉon, li prezentis sian ideon en anekdoto aŭ en fablo, en kiu estis ilustrata nantaŭnaska vivo de li mem kaj aliaj personoj koncernantaj. Tiaj rakontoj estas konataj kiel “Ĵataka”, antaŭnaskaj rakontoj.

Pli potenca ol liaj metodo kaj vortoj estis la mirinda personeco de Budao. Kiam li parolas kun iuj, lia serena mieno inspiris ilin per timo kaj respekto, kaj lia aminda voĉo kortuŝis ilin per ĝojo kaj miro. Ĉu nur parolo povis konverti rabiston, Angulimalon aŭ hommanginton de Atavi? Veni sub lian ĉarmon estas esti lia^[tiel!] por eterne. Li estis venkinto de koroj. Kio lin kredigis^[tiel!] al liaj aŭskultantoj; tio ne estas pro tio, ke li predikis la veron, sed pro tio, ke li venkis la korojn de aŭskultantoj kaj liaj vortoj aperis al ili veraj kaj bonefikaj. Lia unu vorto estis sufiĉa por pacigi la reĝon Prasenaĵiton kun la reĝino Maliko. Ĉu tio ne estas la influo de la amo de la majstro, ke Roĵao, malliano^[tiel!], sekvis lin kiel bovido sekvas la bovinon? Vidi lin estas esti penetrita de lia amo (*majtri*) kaj koni lin estas ami lin eterne.

Sur sia lasta predikvojaĝo la majstro alvenis en la urbon Pava, kaj en la domo de Ĉunda, kiu estis metalisto, ricevis la lastan regalon. Post tio li malsaniĝis kaj iris al Kusinagaro en la orienta parto de Nepala Terai, kie en la aĝo de okdek jaroj li mortis en ĉirkaŭ 483 A.K. Li eĉ en la lasta momento akceptis la monaĥon Subadro kaj klarigis Noblajn Ok Vojojn kaj konvertis lin al la vera kredo. Liaj lastaj vortoj al siaj disĉiploj estis: “Detruigo estas natura en ĉiuj kunigitaj aĵoj. Serĉu scion kaj ellaboru vian saviĝon diligente.”

La korpo de Budao estis bruligita de malaoj en Kusinagaro kun ĉiuj honoro kaj pompo indaj^[tiel!] je la reĝo de reĝoj. Post la kremacio la sankta restaĵo estis portita al la urbodomo, kovrate de kupolo de lancoj en ĉiukaŭbaro de pafarkoj kaj estis honorata per

girlandoj, parfumoj, muziko kaj dancoj. Kiam Aĵatasatro, la reĝo de Magado, aŭdis la morton de la majstro en Kusinagaro, li sendis ambasadoron al malaoj de tiu loko, kaj postulis de ili parton de la sankta restaĵo, ĉar li deziris konstrui stupon por honori lian cindron. Kaj al ili la saman postulon faris la liĉavoj en Vesalio, la ŝakaoj en Kapilavasto, la bulioj en Alahapo, la kolijoj en Ramagramo kaj la malaoj en Pavao. Ankaŭ bramanoj en Vetadvipo postulis ĝian parton kun la preteksto ke li estis bramano. En la komenco la malaoj en Kusinagaro ne volis akcepti la proponojn, ĉar la majstro mortis (eniris Parinirvanon) en ilia regiono. Sed laŭ la konsilo de la bramano Dronao, kiu montris al la malaoj malbonecon fari konflikton pri la restaĵo de la homo, kiu instruis al la homaro universalan fratecon, la malaoj en Kusinagaro ŝanĝis sian volon. La bramano Dronao estis komisiita disdoni la restaĵon, kaj li mem ricevis la urnon, sur kiu li konstruis stupon. Post la disdono la maŭrjoj de Pipalavano, sendis senditon por postuli kelkan restaĵon sed ili devis kontentiĝi ricevinte nur karbon de la funebra fajro. Ĉiuj, kiuj ricevis parton de la restaĵoj (*dhata*), konservis ĝin en sankta restaĵejo, dagobo (*dhathugarbhas*), kiun ili starigis respektive en sia lando. Oni diras, ke tiun ĉi restaĵon la imperiestro Asoko elfosis el tiuj antikvaj dagoboj kaj la restaĵon dissendis ĉien en sia tuta vasta imperio, kaj por konservi ilin konstruis pli ol okdek milojn da stupoj kaj dagoboj.

Tia estis la vivo de Budao en historio, liberigita for de fantaziaj aldonadoj de piaj idaroj. Estas malfacile diri, kiom da partoj el ili povas esti reala historio. Sed estas neniam dubo pri historieco de Gotamo Ŝakamunio mem. Kiel Minajef¹ rimarkis en sia verko "Studoj en Budaismo" (*Recherches sur le Budhisme*²), tio estas senduba fakto ke grandaj personoj historiaj ĉiam aperas precipe en la komenco de grandaj historiaj movadoj, kaj certe tio okazis en la historio de Budaismo kaj ni ne povas dubi ke ĝia disvolviĝo ankaŭ komenciĝis kun agado de historia persono Budao. Sed sin trovas kelkaj orientologoj, ekzemple S-ro Emil Senart³, kiu ne tute neante la ekziston de historia persono Budao, provas pruvi per argumento ke malmultaj historiaj elementoj estas envolvitaj per mitaj elkreskaĵoj tiel kiel oni ne povas determini la historiajn elementojn kun certe. "Estas necese," diris S-ro E. Senart en sia "Traktato pri la Legendoj de Budao" (*Essai sur la Legende du Buddha*⁴), "rekonu ke escepte malmultajn aŭtentikajn memoraĵojn, kiuj facile malaperas de miaj fingroj, entute, la legendo de Budao prezentas sendube nek realan vivon nek eĉ vivon kolorigitan per fantaziaj elpensadoj, sed ĝi estas esence la poezia gloraĵo de mita kaj dieca tipo, kiun populara respekto donas fikse kiel aŭreolon sur la kapo de perfekte homa, reala fondinto de religio."

¹ Verŝajne erartajpo de Minayeff

² Verŝajne erartajpo de "Bouddhisme"

³ Verŝajne erartajpo de Émile Senart

⁴ Verŝajne erartajpo de "Bouddha"

Ekzamenante tiun ĉi opinionon de S-ro Senart, en sia speciala verko “Marao kaj Budao” D-ro Ernsto Vindiŝ¹ skribis: “Kiam ni konsideras, kiel longe Gotamo Ŝakamunio travivis, kiel malproksimen li vojaĝadis, kiel bone li devis esti konata de siaj samtempoj, kiam ni plie konsideras, kiel malnovaj estas kelke de tekstoj, almenaŭ partoj de Vinajapitako, ne estas senkritike rigardi kiel historian ion, kio ŝajnas al ni historia realaĵo. Tio ĉi pli multe konvenas al historia metodo ol rigardi la simplan rakonton de la vivo kaj okazintaĵoj en la tempo kiel transformiĝon de mito en ordinaran vivon. Krome, tiu ĉi procedo devas esti efektivigita en tolereble mallonga tempo. Ĉar, kontraŭ la aserto de S-ro Senart ke la mita tendenco povas trovi siajn postsignojn malantaŭe en la plej fruaj tagoj de Budaismo, mi kuraĝas montri ke en plej malnovaj budaismaj literaturoj ni renkontas nur tiajn tendencojn, kiaj estas ĝenerala karakterizaj por ordinara vivo, personoj kaj okazaĵoj, en kiuj neniuj senpartia observanto povas trovi postesignojn de mito. Al la historiaj okazaĵoj, kiuj laŭ S-ro Senart povas havi nur mitan signifon, apartenas antaŭ ĉio la tradicio, ke Budao atingis la plej altan scion sub “*njagroda*_[tiel!] arbo.” Tiu sama scienculo samtempe kritikis la opinionon prezentitan de D-ro H. Kern ke la legendo povas esti konstatita kiel perfekta vero, se oni vidas tion kiel mitan transformiĝon de astronomiaj fenomenoj, kaj traktis ĝin senvalora per la rimarko ke la rimarkinda astronomia scio de D-ro Kern ebligis lin vidi stelojn brilantajn tie, kie ne sin trovas eĉ malgranda motivo de tia supozo.

Kia ajn estas la verdikto de historia kritiko pri la detaloj de l’ vero de Gotamo Ŝakamunio, estas sendube ke inter fondintoj de religioj li okupas rimarkindan lokon. Lia majesta sintenado, lia alta intelekta naturdoto, lia penetrema rigardo, lia oratora potenco, lia ĝentileco, bonkoreco, kaj indulgeco, kaj la allogeco de lia katakteroj - ĉiuj pruvas lian grandecon. “Inter herezaj pioniroj de la vereco,” diris Episkopo Milman, “mi sentas pli kaj pli ke Ŝakamunio estas plej proksima en la karaktero kaj efekte al Li Kristo, kiu estas la vojo, la vero, kaj la vivo.” Simile diras eĉ Bartelemi Sant-Hiler (Barthelemy Saint-Hilaire²), kiu ne havas finon por ataki kontraŭ Budaismo: “Esceptante sole Kriston, neniuj ekzistis pli pura kaj pli multe kortuŝanta persono ol Budao inter fondintoj de religioj. Lia vivo estas senmakula; li estas la plena modelo de heroismo, sinofero, amo kaj mildeco.” Sed senpartia filozofia kritikisto trovas fakton ke Gotamo Ŝakamunio superstaras super la fondintoj de ĉiuj ceteraj religioj per sia vivo, per sia persona karaktero, per la metodoj instruaj de li uzitaj, kaj per sia fina sukceso. En li estis kunligitaj la plej noblaj ecoj kaj la intelekto de saĝulo kaj la pasia sindonemo de la martiro. Kvankam li estis naskita en aristokrata kaj reganta klaso, Gotamo Budao vivis

¹ Ernst Windisch. Eble Takeuĉi deziris transskribi fonetike laŭ Esperanta maniero. Sed estas konfuzo. Kial necesas aldoni sufikson -o antaŭ “Ernst”? Takeuĉi en la antaŭa paragrafo skribis “Senart”, sed se li vere intencas transskribi kun sama principo, ĝi devas esti “Senaar”. Tial oni ne povas ne pensi, ke la skribmaniero de Takeuĉi estas tute konfuza kaj arbitra. La samo videblas ankaŭ en transskribo de hindaj nomoj.

² Lia ĝusta nomo estas: Jules Barthélemy-Saint-Hilaire, kaj fonetike Ĵul Bartelmi-San-Ileer

vivon de ordinara homo, forlasante la malvastan distingecon de kasto, rango kaj riĉeco. Li konis la mondon. Li estis filo, edzo, patro kaj sincera amiko. Li estis ne nur homo, sed ankaŭ li neniam deklaris sin io superhoma. Li mem provis religion de siaj prapatroj, sed fine kreis por si mem noblan kredon. Lia instruado estis perfekta, sed neniam li pretendis ĝin supernatura revelacio. Li ne dubis homan kapablecon kompreni la veron, kaj neniam sin turnis al la artoj de ekzorcizo^[tiel!]. Li metis la bazon de ĉiu sia rezonado sur fakto de hoam ekzistado, kaj disvolvigis sian praktikan filozofion per la observado kaj ekzakta studo de homa naturo. En antikva tempo ankoraŭ nescianta sciencon, por problemoj de Dekie, Alkie, kaj Kial li trovis solvojn indajn eĉ en scienca tempo. Lia celo estis savi la homaron el la katenoj de pasio kaj avareco, kaj konvinki la homaron per idealo pli alta ol nura monda feliĉo. Li predikis la evangelion de rezigno atingebla per meditado, la rezigno, kiu ne kondukas homon al songema kvietismo de panteisma aŭ nihilisma filozofio, sed al purigo de homa aktiveco per intelekta kaj etika klereco en eterna Darmakajo.

Inter tutmondaj religiaj instruistoj Gotamo Ŝakamunio sole havas la gloron de la homo, kiu prave juĝis la intrinsekan grandecon de homa kapableco savi sin mem sen ekstera helpo. Se “la valoro de vere granda homo konsistas en tio ke li levas la valoron de la tuta homaro,” kiu pli rajtas ricevi la titolon de la plej granda homo ol Bagavo, kiu, anstataŭ malaltigi homon metante alian estaĵon super homon, levis homon al la plej alta pinto de saĝeco kaj amo? Lia figuro estis la plej nobla, la plej perfekta, kiun homoj povas ricevi. Ĝi estis genio nekomparebla inter filoj de homoj, kiu inspiris la instruon de Budao. Ĝi estis genio komandanta per diktatoreca forto, kiu tenis lian ordon. Ĝi estis genio la unua kaj la lasta inter hindoj, kiu antaŭdiris en altegaj celoj kaj universaleco la eblon unuigi la popolojn en unu grandan nacion, se tio estas ebla. Vere Tatagato estas la lumo de la mondo. Ne mirinde estas ke tiuj, kiuj en la komenco rifuzis lian instruon, fine devis akcepti lin en ilian panteonon kiel avataraon de unu el la efektivaj dioj, kiujn li mem forĵetis!

“Nur tiuj estas di-similaj, kiuj sin detenas de peko
La anim-blankaj trankvilaj sopirantoj de bono.”

Neniu instruisto estis tiel dion ignoranta kiel Buddao, sed neniu estis tiel di-simila. Kvankam li estis la mastro de ĉiuj, li estis universala frato de ĉiuj. Li malestimis la malsaĝecon de l' mondo, sed li vivis kaj agis inter homoj serene kaj kompatoplene. Se li estis ĉirkaŭita de ĉiuj siaj sekvantoj honorigita de la tuta mondo, li neniam pensis eĉ unu fojon ke tiu privilegio apartenas al li; sed li nur faradis bonon, kiel la pluvo alportas ĝojegon, sed ne pripensis sian laboron. Kvankam li estis laŭdata kaj adorata sed neniam arogis al li ke li mem estas dieca. La birmanoj skribis ke kiam foje multaj homoj kantas himnon lin glorantan, Budao aŭdante tion, vokis Anandon kaj parolis: “Mi tute ne indas por tia laŭdo. Ne tia vanta respekto povas plenumi la vortojn de Darmo. Tiuj,

kiuj agas juste, repagas al mi plej multe, kaj min ĝojigas plej multe.” Por la sentantaŭjuĝema pensulo eĉ la legendoj, kiuj enkovras la vivon de Ŝakamunio, ne estas sensignifa. Tiaj rakontoj altege prezentas al ni vere admirindan figuron: homo kviete majesta, kun saĝo kaj agrabla humoro, akordanta je la penso, vorto kaj ago, de perfekta egalanimeco kaj morala fervoro libera de ĉiuj antaŭjuĝoj, venkinte mabonon per bono, kaj plena de kompatato al la tuta estaĵaro. En iuj el la legendoj, tiel nomataj naskrakontoj, Budaon estas prezentita kiel tia homo, kiu memvole toleris senfinajn malĝojojn kaj suferadojn tra sennombraj miljaroj, por savi la homaron, forlasis la rajton eniri en nirvanon, kaj li multfoje ĵetis sin en la fluon de homa vivo kaj destino por la sola celo instrui la vojon de liberiĝo for de malĝojo kaj suferado. La idealo de konstanta energio, kiu estis prezentita antaŭ la disĉiploj, estas tre homeca. Kaj eĉ se la virto de Tatagato estas senlime pli alta ol virto de ordinara homo, ankoraŭ la idealo servas kiel modelo kaj gvidanto. La disĉiploj ĉiam povas vidi Budaon kiel modelon, sekve la memoro pri lia heroa kaj sanktula vivo eble helpas ilin por esti herooj kaj sanktuloj. En sia supermezura amo al ĉiuj estaĵoj Ŝakamunio estas senkompara. Kaj tiu estas ne poezia fantazio sed profunda filozofia vero, kiu igis lin la plej bonega,

“kiu amas plej bonege
Ĉiujn estaĵojn, ĉu grandaj aŭ malgrandaj.”

TABELO DE KELKAJ PROPRAJ NOMOJ KAJ TEKNIKAJ VORTOJ

[Mallongigoj: - S=Sanskrita, P=Palia, J=Japana]¹

Aĵatasatro: S) Ajātaśatru, P) Ajātasattu

Aĵnato: S) Ajñāta, P) Aññāta

Ambapalo: S.P) Ambapālī

Anando: S.P) Ānanda

Anatapindikio: S) Anāthapiṇḍada

Anurudo: S.P) Anuruddha

Asvaĵito: S) Asvajit

Asoko: S) Aśoka, P) Asoka

bagavo: S) Bhagavat, P) Bhagavā: - titolo de budao kiu signifas plej respektindan homon, en la mondo.

bikŝuo: S) bhikṣu, P) bhikkhu, J) biku: - homo, kiu nutras sin per almozo por ke li atingu al vera liberiĝo, forlasante siajn hejmon, familion kaj ĉiujn posedaĵojn.

Bimbisaro: S.P) Bimbisāra

Bodio: S.P) Bodhi

Bodisatvo: S) Bodhisattva, P) Bohisatta

budao: S.P.) Buddha, J) Bucu: - la vorto devenis de ariana^[tiel] vortoradiko kun la signifo “scii”

Darmo: S) Dharma, P) Dhamma: - la vorto devenis de ariana vortradiko “Dhar (teni)”, ĝi signifas tion, kion oni tenas aŭ kion oni okupas, subjektive ĝi esprimas “devon” “moralon”, kaj plie ĝi esprimas doktrinon, religion kaj Budaismon. Objektive ĝi estas uzita en la senco de normo kaj leĝo (regna leĝo) kaj io apartenanta, propreco, plie derivite ĝi esprimas elementon, principon, kaj ĝi fine esprimas ĉion, kio konsistigas universon.

Darmakajo: S) Dharma-kāya, P) Dhamma-kāya

Darmapado: P) Dhammapada

Devadato: S.P) Devadatta

Gotamo: S) Gautama, P) Gotama

Jasodaro: S) Yaśodharā, P) Yasodharā

Kapilavasto: S) Kapilavastu, P) Kapilavatthu

Ksatrio: S) Kṣatriya, P) Khattiya²: - nomo de reganta klaso, al kiu apartenis Gotamo.

Lumbini-parko: S) Lumbinī, P) Lumbini

¹ En tiu ĉi listo Takeuĉi metis sanskritan kaj palian formon, sed foje li erare skribis. Mi korektis erarojn sen komentario.

² Mi ne povis scii la ekzaktan formon en la palia. En la prakrito (vulgara lingvo en la antikva norda hindio) “Khatri”.

Maha Kasjapo: S) Mahā Kāśyapa, P) Mahā Kassapa

Majao: S.P) Māyā

majtro: S) maitrī: - signifas amon, kiu havas neniom da asociacio^[tiel!] de egoisma amo

Maliko: S) Mālika, P) Mallika

nirvano: S) nirvāna, P) nibbāna

samgo: S) saṃgha, P) saṅgha, J) sanga

samsaro: S.P) saṃsāra: - metempsikozo

Sidarto: S) Siddhārtha, P) Siddattha, J) Sitta

Sudodano: S) Śuddhodana, P) Suddhodana

Ŝakao: S) Śakya, P) Sakiya, J) Ŝaka: - nomo de gento

Ŝakamunio: S) Śkyamuni: - sanktulo de Ŝakao

tatagato: S) tathāgata: - titolo de budao, kiu signifas personigon de la vero

viharo: S.P) vihāra: - loĝejo de Budao kaj lia samgo

(Pluan klarigon oni trovos en la sekvanta kajero)

Postparolo

Per tiu ĉi libreto mi ne intencas prezenti al vi, legantoj, bonan stilon aŭ spritan esprimon, sed mi arde deziras komuniki al vi tute racian ideon malnovan, sed ĉiam freŝan.

Tiu ĉi artikolo estas traduko de “Budao Historia”, la unua ĉapitro de “Esenco de Budaismo” verkita de hindo, P. Lakŝmi Narasu, kiu estis profesoro de natura scienco en Madras Universitato en Hindujo.

En infaneco mi estis edukita de diligenta metiisto, mia avo, kiel serioza budaano, sed mi perdis la kredon, kiam mi vidis absurdecon en tradicia Budaismo, mi do penis por forviŝi de mi postsignon de l’ religio. Tiam mi feliĉe ricevis de miaj aikoj kelkajn librojn pri racia Budaismo. Per tiuj libroj mi retrovis mian utopion, ili instigis al mi lernadon de Espernto kaj disvastigon de la ideo de neŭtrala lingvo, inter ili sin trovis la libro “Esenco de Budaismo”. Mi tre longe atendis aperon de la verko en Esperanto, ĉar per mia mizera scio en Esperanto ne estis eble plenumi tion; eĉ tiun ĉi tradukon mi ne povis mem sola, sed dank’ al kunlaboro de sinjoro Okamoto-Joŝicugu. Li sindone komparis mian manuskripton kun laoriginala verko kaj zorgis dum la presado.

Speciale al gesamideanoj, kiuj komprenas lingvon anglan aŭ japanan, mi esperas ke vi legos la verkon originalan aŭ tradukitan en japana linvo, kaj se la verko plaĉos al vi, mi petes vin, ke vi prenu la taskon traduki pluajn ĉapitrojn de la libro, ĉar mi nun preparas tradukon de la dua ĉapitro, sed mi ne povos plu daŭrigi la laboron, pro mizereco de mia talento kaj financo. Kaj mi esperas, ke ni havos kompletan tradukon de “Esenco de Budaismo” per sincera kunlaboro de kompetentaj gesamideanoj.

Ĉe apero de ĉi tiu libreto mi devas danki al samideanoj Abe-Kacuŝiro, Ijĵima-Miĉio, Harajama-Takeŝi, kiuj helpis la aferon morale kaj materiale. Ankaŭ mi esprimas mian sinceran dankon al sinjoro Joŝiike-Rjooĵi kaj al sinjoro Handa-Kookai, la unua pruntedonis al mi la japanan tradukon, la dua la originanan verkon lasis sub mia dispono.

Pri metodo por enkonduko de vortradikoj mi volas aŭdi opiniojn de raciaj esperantistoj en diversaj lokoj, tial mi atendas de vi kritikaĵojn pri la vortoj, kiuj estas uzitaj en tiu ĉi libreto.

Septembro, 1932

La tradukinto

LA SEP PRINCIPOJ KIUJ KONDUKAS AL PROSPERO

EL “DIGA NIKAJO”

Korektita de
Fraŭlino Tekla Flinto
Sinjoro Geo. H. Yoxon

Laŭ japana traduko
Libere rerakontita
de Takeuĉi - Tookiĉi

“Li insultis min, li batis min, li venkis min, li rabis de mi” - en tiuj, kiuj tenadas tiajn pensojn, neniam ĉesos malamo.

“Li insultis min, li batis min, li venkis min, li rabis de mi” - en tiuj, kiuj ne tenas tiajn pensojn, tute ĉesos malamo.

“Neniam malamo ĉesas per malamo, malamo ĉesas nur per senmalamo” - tiu ĉe estas instruo de pratempaj sanktuloj.

“Ni baldaŭ proksimigos morton,” - tion ili ne komprenas; kiam ili ekkomprenas tion, tiam ĉesos tuta malpaco.

EL “DARMAPADO”

La sep principoj, kiuj kondukas al prospero

1) Kiam Budao atingis la aĝon de okdek jaroj, li loĝis sur Monto Giĵakuta apud Raĝagriho, ĉefurbo de Magado. Tiam Reĝo Aĵatsatro de Magado volis invadi la komunumon Vaĵion, kaj ordonis al sia ministro Vasakaro: "Nun Budao loĝas en proksimo de mi, iru tien, kaj riverencu al li en mia nomo kaj petu instruon de li, kaj ĝin bone momoru por ke vi povu ĝin rakonti al mi. Ĉar paroloj de Budao ĉiam estas ja pura vero."

Vasakaro laŭ la ordono tuj preparigis veturilon kaj supreniris sur la monton Giĵakuta kaj sidiĝis antaŭ Budao, li riverencis kapkliniĝante ĉe la piedoj de Budao. Kaj diris "Reĝo Aĵatsatro de Magado riverencas ĉe viaj piedoj, kaj demandas al vi: Bagavo, ĉu vi estas sana? Ĉu vi prenas regule manĝon kaj trinkon?" Bagavo respondis. "Bone mi fartas, ĉu la reĝo kaj la poplolo fartas en bona konkordo? Ĉu kostoj de diversaj objektoj estas konvenaj?" "Feliĉe, dank' al Budao, ĉio estas en harmonio, kaj vento kaj pluvo vizitadas en bona ordo. Do ĉio riĉe prosperas en nia lando." Vasakaro tiel dankante daŭrigis sian parolon. "Bagavo, mia reĝo Aĵatsatro jam de longe volas konkeri Vaĵion, ĉar la popolo de Vaĵio, fidante sian forton, ne obeas la ordonon de la reĝo. Kiel vi opinias pri tiu afero? Bonvole donu instruon al mi por mia reĝo." "Ho, nun mi rememoras tion ke antaŭe mi vojaĝis en Vaĵio, kaj mi restis en viharo Ĉapara, tiam al mi venis la komunumanoj, junaj kaj maljunaj, kaj ili parolis al mi, ke la reĝo de Magado intencas invadi nian landon, tial ni kune gardas nian landon kun plena atento. Do mi parolis al ili: Vi ne bezonas timi, se vi aranĝas la ordonon de via komunumo laŭ la sep principoj, neniu povos pereigi vin. Kaj mi diris al ili la sep principojn, eble oni ne povos venki ilin, se ankoraŭ nun ili sin tenas memorante la sep principojn." Vasakaro diris al li. "Bagavo, ankaŭ al mi instruu la sep principojn, mi petas vin."

2) Budao turnis sin al Anando, kiu staris apud li, kaj ventumas al Budao per ventumilo, kaj demandis al li: "Anando, ĉu vi aŭdis, ke la popolo de Vaĵio ofte kunvenadas por intertrakti politikan aferon kaj pretigas armadon kaj gardas sian landon?" "Jes, mia Bagavo, mi aŭdis tion." "Do oni ne povas konkeri ilin. Anando, ĉu vi aŭdis, ke la komunumanoj eminentaj kaj maleminentaj, intertraktas en bona harmonio?" "Jes mi aŭdis tion." "Do oni ne povas venki ilin. Anando, ĉu vi aŭdis ke ili saĝe sekvas la tradician moron kaj ĝentile estimas unu la alian kaj ke en la komunumo viroj kaj virinoj plenumas sian propran taskon, kaj junuloj kaj maljunuloj intertraktas kaj ili komprenas plene unu kun la aliaj?" Jesis Anando, demado sekvis. "Ĉu ili servas bone al siaj gepatroj, kaj, obeas al kleruloj kaj gvidantoj?" "Ĉu ili respektas la prapatrojn kaj daŭrigas festojn laŭ tradicio, kaj ĉu ili respektas la leĝon kaj honoras virton, kaj se bonkondata homo venas en la landon, ĉu ili regalias tiun homon kaj donas al li vestaĵojn kaj manĝaĵojn, loĝejon kaj medikamentojn?" Anando respondis per jeso al ĉiuj demandoj. Bagavo parolis: "Do Vaĵio nepre ne malprosperos. Se la komunumanoj ĉiuj agas laŭ ĉi tiuj principoj, eble ilin neniu povas konkeri, eĉ se ilin

atakas ĉiuj armeoj de la tuta mondo.” Aŭskultante tiujn ĉi parolojn, Vasakaro diris. “Vaĵianoj estas potencaj eĉ tenante unu el la principoj, ili tenas tuton de la sep principoj, oni neniel povas pereigi ilin.” Kun danko li profunde riverencis al Bagavo kaj foriris. Kaj li rakontis ĉion al la reĝo Aĵatsatro kaj evitigis militon, kiun intgencis la reĝo.

3) Post foriro de Vasakaro, Bagavo ordonis al Anando, ke li voku ĉiujn disĉiplojn, kiuj loĝas proksime, en la aŭditorion. Kiam ili kunsidis en la ĉambrego, Bagavo sidiĝis antaŭ ili kaj parolis l ili: “Karaj disĉiploj, mi nun parolas al vi la sep principojn, kiuj kondukas al prospero, vi ĉiuj bone aŭskultu kaj memoru en via koro mian instruon. Karaj disĉiploj, vi ofte kunsidu kaj parolu inter vi reciproke pri Darmono. Pro tio Bodio restos longedaŭre. Vi, eminentaj kaj ne eminentaj, reciproke vin estimu en paco kaj gloru la Darmon, kaj akceptu humile admonojn. Maljunaj kaj junaj, antaŭirantaj kaj postirantaj, vi ĉiuj interrilatu al si reciproke en bona ĝentileco, honesteco kaj toleremo. Gardu vian propran koron kontraŭ avido. En trankvila loko vi purigu vian agon. Cedu vi mem, permesu aliajn homojn, kiuj venas al vi, kaj flegu malsanulojn. Sekve Darmono restos longe inter vi.”

“Karaj disĉiploj, ankoraŭ estas sep principoj, kiuj prosperigas sanktan Bodion, tio estas, ke vi nur volu purecon, sed ne volu posedaĵojn, vi estu malavaraĵ, ne avidaj. Estu pacienca, serioza kaj sinfiera. Alte tenu Darmon. Gardu la unuon en la koro senhezite. Estu modesta, malluksa je vestaĵoj kaj manĝaĵoj. Certe Darmono restos longe sur la tero.”

4) “Karaj disĉiploj, vi rigardu ĉion vivantan kun majtro, kiam homo mortas, tiam vi kompatu lin kun funebro. Homo, kiu mortas, ne scias, kiel li iras. Kun ĉagreno plorĝemantaj ankaŭ ne scias, kien ili iras. Nur scias tiu, kiu atingis Bodion. Tial Tatagato prezentas la doktrinon. Lernu la doktrinon kaj vivu laŭ la doktrino. En la mondo ekzistas multaj leĝoj, inter ili grandaj estas regnaj leĝoj, sed Darmono de budaoj estas pli alta ol ili. Karaj disĉiploj, sekvantoj de la budao, kiuj ankoraŭ ne atingis Bodion, ne devas ĉagreniĝi vidante tion, ke alia persono atingis Boion. Ĉar kiam oni disciplinas sin penante senĉese, certe ili atingas Bodion, same kial multaj homoj, kiuj ekzercas sin en pafarto kune. Ĉiuj ne trafas samtempe, sed trafas iu en komenco, aliaj poste, iu pli poste, sed se oni penas diligente en la ekzerco, certe ili fine trafas. Ankaŭ same kiel akvo fluanta en malgranda valo, kiu plie fluante, enfluas en grandan riveron kaj finfine eniras en la maron.” Ĉiuj disĉiploj aŭskultantaj la instruon ektrovis sin en milda ĝojo.

El “DIGA NIKAJO” laŭ japana traduko
en Budaisma Sankta Libro nove kompilita.

Feliĉaj ni vivu, inter malamantoj sen malamo. Meze de homoj, kiuj malamas, sen malamo ni loĝadu.

197.

Se ni venkas, naskiĝas malamikeco. Se ni malvenkas, ni mem devas suferadi. Venkon kaj malvenkon ambaŭ formetinte, trankviliganta sian koron la homo povas loĝi feliĉe.

201.

Malsato estas la plej malbona malsano, komponata ekzisto la plej malbona aflikto. Kiam ni komprenas ĉi tion, laŭvere kaj laŭfakte, Nirvano fariĝas la plej alta feliĉo.

203

Bonsano estas la plej grava gajno, kontento la plej valora riĉaĵo, fidinda amiko la plej bona parenco, Nirvano la plej alta feliĉo.

204

DARMAPADO

(Kun kelkaj ŝanĝoj laŭ la traduko de s-ro G .H. Yoxon)